

ESPERANTO

★ TRIUMFANTA ★

N-ro 28, 17. Aprilo 1921

Jurnalo internacia, universala, sendependa
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

* Eliras semajne. *

Anoj de 40 Ŝtatoj abonas ET.

De n-ro 27 ricevis Hispanio 68 ekz., Portugalio 55, Francio 41, Belgio 6, Holando 125, Luksemburgo 1, Anglio, Skotlando kaj Irlando 70, Svedio 54, Norvegio 14, Danio 1, Islando 2, Finnlando 50, Estonio 67, Litovio 45, Latvio 1, Ruslando 8, Polio 103, Ĉeĥoslovakio 45, Rumanio 41, Bulgario 19, Jugoslavio 2, Turkio 4, Italio 52, Svisio 16, Japanio 9, Palestino 1, Georgio 1, Aŭstralio 1, Usono 16, Kuba 5, Meksikio 1, Kanadio 4, Brazilio 21, Argentino 16, Hungario 105, Aŭstrio 67, Danzig 50, Germanio 487. Por la Revela Kongreso en Köln (10. aprilo) ni disponigas krome 400 ekzemplerojn. La tuta eldonnombro de la antaŭa numero estis ĉ. 2200.

Pagantaj abonantoj nun estas eble 850, opaj aĉetantoj (pri kiuj ni estas certaj) minimume 350. Entute nia certa abonantaro do estas 1200, krome ĉ. 90 regulaj nepagantaj ricevantoj. Ni esperas, ke ankaŭ aliaj urboj, kiuj nun estas provantaj la opan vendadon, povos sciigi ĝojigan rezultaton, tiel ke ni jam nun rajtas kalkuli je minimume 1500 pagantaj abonantoj.

Ci-sekvante la urboj, kiuj utiligis nian proponon pri la opan vendado, kun la nombro de la ricevataj ekzempleroj:

Bamberg 10, Barcelona 12, Béziers 20, Bialystok 12, Bilbao 40, Braunschweig 10, Budapeŝt 60, Buenos Aires 12, Bydgoszcz-Bromberg 20, Cibin (Sibiu) 10, Danzig 25, Düsseldorf 20, Essen 10, Fortaleza-Ceara 8, Graz 10, Hannover 10, Hengelo 100 (por diversaj nederlandaj urboj), Kaunas-Kovno 10, Kniittfeld 10, Koblenz 10, Köln-Malk 10, Lisboa 20, London 15, Mannheim 10, Miskole 50, Nürnberg 15, Nusle 8, Plauen 15, Rovereto 10, Siedlice 12, Stuttgart 15, Tallinn-Reval 20, Targul-Mureş 30, Wien 10.

Povas esti, ke kelkaj nombroj jam ne estas precizaj; ĉar ili konstante ŝanĝiĝas. Tamen nun ni povas eldiri, ke la daŭra ekzistado de ET estas certigita, kvankam la nuna nombro de abonantoj ankoraŭ ne sufiĉas por igi la ĵurnalon sendependa je ĉiuj eblaj incidentoj.

Multan dankon ni ŝuldas al kelkaj bonvolaj helpantoj kaj kunlaborantoj, sen kies valora subteno ni ne jam estus atingintaj tiel belan rezultaton. Precipe ni dankas al s-ro G. van Heek en Hengelo (Nederl.), kiu ne sole tute malavare donacis konsiderindan sumon por la propagando de nia ĵurnalo, sed kiu eĉ mem regule ekspedadis grandan kvanton da ekzempleroj en sia lando.

Granda bato por nia entrepreno estis ja la plialtigado de la kostoj por gazetpapero kaj afranko, kiuj ambaŭ kune ekvalidis depost 1. aprilo. Tio surŝarĝas al ni novan elspezon de pli ol 600 mk. ĉiumonate. Tamen ni ne plialtigis pro tio la abonprezojn de nia ĵurnalo. Eĉ ni intencas, post kelke da tempo regule pliampliksi ĝin ĉu per aldono de 2 pliaj paĝoj ĉu per pligrandigo de la formato. Tion ni faros en la espero, ke per tio ni gajnos kelkcentojn da novaj abonantoj kaj amikoj, tiel ke la dua milo da abonantoj estos baldaŭ atingita.

Niaj nepresitaj manuskriptoj amasiĝas de semajno al semajno. La plej multaj el ili estas tute indaj por esti publikigitaj; sed kion ni faru? Ni simple ne povas publikigi ilin kaj ne scias alian konsilon ol prokrasti ilin, ĝis la loko en ET estos pli vasta. Do ni petas niajn kunlaborantojn, precipe la sendintojn de longaj artikoloj aperigeblaj nur je daŭrigo, aŭ pacienciĝi ankoraŭ ĝis konvena tempo aŭ restopli siajn manuskriptojn.

Sole la literaturaj kaj sciencaj manuskriptoj, kiujn ni posedas, sufiĉas por pleniĝi minimume 50 paĝojn de ET. Pliampleksigo de la ĵurnalo do estas necesa.

Kiel ĝin efektiviĝi, ki nun serĉas vojojn kaj rimedojn.

Germanajn Abonantojn

ni atentigas, ke ET nun estas abonebla ankaŭ ĉe la poŝto. Do ni petas niajn germanajn abonantojn, por ŝpari al ni afrankokostojn kaj laboron, post finiĝo de sia abono pagi al la administracio de ET nur ĝis n-ro 58 (fino de junio) kaj depost julio mendi ET ĉe sia poŝtoŝtelo. La prezo ĉe la poŝto estas la sama kiel ĉe la administracio de ET (kvaronjare 13 mk.).

Tra mia Kalejdoskopio. 12 Bildoj kaj Resumo pri la Printempa Kongreso de Rejnlanda-Vestfalia Eperanto-Ligo en Köln (9.—10. Aprilo).

1. En kupeo de „duoble dua“ klaso. Plenplenece je homoj. Staras unu apud alia kiel haringoj en barelo. Halto ĉe stacio. Pordo malfermiĝas. Eniras ankoraŭ pli da homoj. Ili portas ŝtelojn. Interparolas en nekonata lingvo. La publiko rigardas, aŭskultas. Kelkiuj ekkaptas la vorton „Esperanto“. Iu scias la signifon, klarigas ĝin gravamiene al aliaj. Generala interesiĝo. Demandoj kaj respondoj. Interesa diskutado. Kelkaj esprimas la intencan lerni tiun ĉi misteran lingvon, kiu ebligas al ĉiuj ajn homo interkompreniĝi kun anoj de ĉiuj nacioj.

2. Sur perono. Stelportantoj gvidas blindulon. Li venis de malproksime, sen akompano, fidante al la komplezeco de la samideanoj, kiuj akceptos lin ĉe la finstacio. Por esti facile ekkonebla, li portas speciale grandan ŝtelon sur la brusto. La stranga grupo, la granda stelo aliras la atenton de la vojaĝantoj. La vorto „Esperanto“ flugas de buŝo al buŝo.

3. Forlasinte la stacidomon, oni iras kelkajn paŝojn trans placon. Grandaj verdaj ŝteloj anoncas, ke tie estas enirejo por esperantistoj: la Akceptejo. Praktika aranĝo en Urba Informejo pri Loĝejoj. Speciala ĝiĉeto estas disponigita al Revelo. Tie ĉi pulsas freŝa esperanta vivo. Samideanoj eniras, deprenas ĉe la ĝiĉeto siajn kongres-dokumentojn, demandas pri amikoj el aliaj urboj ktp., interbabilas, poste foriras.

4. Eksterkolumnaj samideanoj nepre volas viziti la famegan Dom (Katedralo). Jen ĝi leviĝas, unu el la plej imponaj kaj plej artaj konstruaĵoj de la mondo. Ĝiaj belegaj turoj etendiĝas alen kvazaŭ du fingroj montrantaj al ĉielo. Grandioza la internajo. Regas mistera krepusko. Mi dezirus foje ĉeesti tie esperantan diservon kaj aŭskulti predikon en nia „popollatina“ lingvo.

5. Hohesrato, ĉefa vejno de grandurba trafiko. Aŭtomobiloj tondras kaj muĝas, droŝkoj kraketas, bicikloj serpentumas tra la amaso da homoj, kiuj iras kaj venas, rakontante, babilante en ĉiuj lingvoj. Hodiaŭ el la fremdaj lingvoj superregas la Esperanta. Ĉu vere ĝi estas fremda? Ĉu ne ĝi estas dua lingvo gepatra?

6. Kafejo „Germania“. Vasta moderna kafejo. Kolektiĝejo de la samideanoj. Bona orkestro ludas novajn nebelajn dancmelodiojn plaĉantajn al la nuntempa publiko. La esperantistoj tie trovas multajn konatojn el antaŭa tempo aŭ konatiĝas kun novaj samideanoj.

7. Salutvespero en „Alier Posthof“ je la 7 h. La restoracia salono pleniĝas jam duonan horon antaŭe, ĉar ĉiuj aranĝoj de la kongreso komencos akurate (laŭ indiko de la programo). La vespero fariĝas ĝuoplena, ne sole pro la riĉa kvankam improviziita repertuaro (ludado de citro-kvinteto, deklamoj, kantoj ktp.) sed precipe pro la senĝena kuneŝtado. Oni ne gluigas sur sia seĝo, sed interŝanĝas ofte la lokon babilante kun siaj malnovaj amikoj kaj ligante novajn amikajn interrilatojn. Jen vi povas aŭdi la gajan prezidanton de Revelo rakontantan pri muŝoj kaj „kloŝoj“, jen vin mirigas la bona humoro de la aranĝintestro de la kongreso post tiom da noktoj sendormaj pro preparaj laboregoj, jen apud ili la redaktoro de ET plendanta pri jam trorapida kresko de la abonataro (ĉar la laboro superkreskas lian kapon). Vi trovas la konatan Ekon el Berlino, eldonanton de „Esperanto Praktiko“, en propra persono; vi trovas plue la faman Heineinterpretanton Zanoni el Essen kun sia aminda edzino. Vi trovas la elokventan ĉefredaktoron el Hagen, kies nomo*) iam signifas, ke li staras forlike en la ondeggo de nia kontraŭularo, kies atakojn li facile repuŝas. Vi trovas tiel multe da

fervoraj kaj energiaj samideanoj malnovaj kaj novaj, ke estas neeble citi ĉiun je nomo. Sed ne forgesi mi volas la ĉarmajn junulinojn, kiuj forŝtelis mian koron, tiel ke mi jam ne scias, ĉe kiu el ili mi devas reserĉi ĝin: ĉu ĉe la trikonulino kun la koketaj okuloj, ĉu ĉe la principulino kun la modesta konduto, ĉu ĉe la „nigrulino“ en negoblanka vestaĵo, ĉu ĉe — ho, vi korbarbintinoj, se mi mem mortigos min pro dubo, ĉe kiu mi nun povus retrovi mian koron, estos via kulpo!

8. Dimanĉo. Frumatene en lernejo „Wollküche“. Unua ekzameno okazigata de Revelo. Seriozaj vizaĝoj. Severaj ekzamenantoj, timemaj ekzamenantoj. Sed ĉio iras bone. El 12 ekzamenantoj (2 por la ĉefa, 10 por la elementa ekzameno) sole unu ne sukcesis. Espereble li sukcesos venontajn fojojn.

9. Je 10 h. Riĉenhava esp. ekspozicio en salono de „Wolkenburg“. Multaj vizitantoj. Apude esp. libro estis malfermata. Vendata amaso da lernolibroj, legajoj kaj ĉiuspecaj esperantaĵoj.

Je 11.30 en sama salono solena malfermo de la kongreso antaŭ kelkcentoj da ĉeestantoj per la prezidanto de Revelo s-ro Junker. Salutas s-ro d-ro Meerfeld en la nomo de la ĉefbestro de la urbo Köln, dirante ke li opinias nepre necesa la internacian lingvon, kvankam li mem ankoraŭ ne estas esperantisto. Ĉeestis diversaj eksterlandanoj: vickonsulo de Jugoslavio en Düsseldorf d-ro Krejcer, cetere malnova esperantisto, du holandanoj, brito kaj kelkaj en Köln loĝantaj alianciaj esperantistoj: hispano, holandano, ĉeĥo. Ankaŭ ataseo ĉe la Internacia Komisiono en Düsseldorf, bretona franco s-ro Landoas, estis anoncinta sin por la kongreso sed estis malhelpata. Kelkaj kolonaj ĵurnaloj estis sendintaj raportistojn. Ĉeestis kiel reprezentantino de la estraro de „Libera Studenta Unuiĝo“ ĉe la Kolonia Universitato f-ino M. Jung.

Sekvas elokventa parolado de ĉefredaktoro Hartenfels, en kiu li refutas la kontraŭdirojn de la ne- aŭ malesperantistoj per konvinkaj argumentoj. Riĉega aplaŭdo akompanas lian paroladon.

Poste okazas ankoraŭ fotografado antaŭ la domo.

10. Je 3 h. plej grava parto de la kongreso: la laborkunsido en Stimm-salono de la fama Gürzenich. Estas reprezentataj 20 grupoj kaj 15 izoluloj. Ne reprezentataj estas du grupoj kaj multaj izoluloj. Nove aliĝas grupo Koblenz kun 50 membroj kaj Katolika Grupo Köln.

Prezidanto s-ro Junker parolas pri la sukcesoj de Revelo dum la lasta tempo. El pli ol 100 lokoj de la Revela regiono oni scias adresojn de esperantistoj. — Vicprezidanto s-ro Hurler donas bonajn konsilojn kiamaniere plifaciligi la egan laboron de la estraro. — Kasisto s-ro Jung donas mallongan raporton pri la stato de la kaso kaj pri la spezoj de la kongreso. Menciinde estas, ke por transporto de fortepiano el unu ĉambro en alian oni devis pagi 94 mk. Malgraŭ la altaj elspezoj la kongreso ne havas deficiton.

Laŭ propono de la grupo Köln pri la situacio de la landaj ligoj en GEA, la grupo Hagen estas komisiata ellabori taŭgan projekton. Proponoj Hurler pri ŝanĝoj en la statuto de Revelo laŭ la hodiaŭaj cirkonstancoj estas entute akceptataj. Propono pri aranĝo de gazetaraĵo observejo estas konsentata. Kiel urbo por la aŭtuna kongreso de Revelo estas elektata Hagen. S-ro Klein donas klarigojn pri la preparoj por la germana esp. kongreso en Essen kaj invitas je multenombra partoprenado.

Demandite, s-ro Hurler komunikas, ke la nombro de la aliĝoj al la hodiaŭa Revela kongreso finfine atingis 412. Post fermo de la kunsido s-ro Hartenfels insiĝas al monokoleto por la Revela kaso, kiu rezultigas enspezon de 222 mk.

11. La nepartoprenantoj ĉe la laborkunsido faris komunan promenadon tra la urbo sub gvidado de kolonaj samideanoj. La programo diris, ke kaze de malbona vetero oni vizituis concerton. Felice la ĉielo ridis je printempa bluo. Pli bonan veteron oni eĉ ne povus deziri por kongreso. Do la promenado estis vera ĝuo por la partoprenantoj kaj denove bona propagando por Esperanto.

*) Hartenfels = malmoda roko.

Alproksimiĝas vespero. La stratoj najbaraj al „Lesegesellschaft“ (Legosocietejo) pleniĝas je verdsteluloj, kiuj rapidas por trovi lokon en la salono, kie okazos la festkoncerto. Post prologo parolata de f-ino Nordmayer ni havas okazon aŭskulti la belsonan, perfektan voĉon de s-ino Agnes Wansart-Haines (Düsseldorf) kies arton ni jam povis admiri okaze de nia antaŭa kongreso. Nia en tuta Esperantoj konata blinda hispana samideano s-ro Zapatero majstre ludas gitaro (solajn kaj akompanajn melodiojn por kantoj de s-ro Palm). F-ino Camphaus (Elberfeld) kantas plaĉajn germanajn popolokantojn en Esperanto, f-ino Esther Rolfiana kun granda vervo kantas kabaredokantojn eble ne tute decajn por la aŭskultanto.

Fine venas la granda surprizaĵo: la arangintestro de la kongreso, s-ro Hurler, estas honorata per certe meritita laŭra krono.

Mallonga dancado finas la belan feston — jam tro frue, ĉar ĝuste kiam oni devas disiri, la bonhumoro de la kunestantoj atingas sian plej altan gradon.

Resumo.

La Revela (provincia) Kongreso en Köln estis sendube granda, tute neatendita sukceso. Tion oni devas nepre diri, konsiderante la oficialan akcepton per la urba estraro, la grandan nombron de aliĝoj, kiu eĉ superas tiun de nia internacia kongreso en Hago, kaj la partoprenon de diversaj eksterlandaj samideanoj, inter kiuj tiu de la jugoslaviana vickonsulo el Düsseldorf estas speciale rimarkinda.

Estis ankaŭ ricevitaj multaj salutaj telegramoj kaj leteroj, interalie de la ĉefurbestro de Köln, d-ro Adenauer, konata kiel progresema viro, letero, per kiu li esprimas sian bedaŭron, ke li ne povos mem ĉeesti la kongreson sed delegos s-ron d-ron Meerfeld kiel sian reprezentanton.

Mi esperas, ke la Revela Kongreso en Köln, kiu ja pruvis la tre vigan esp. vivon Rejnlando kaj Vestfalio, estas bona antaŭsigno por la Tutgermana Esp. Kongreso okazonta je Pentekosto en Essen, kien devas iri ĉiu germana esperantisto, kiu iel ajn havas la eblecon.

Do ĝis reveno en Essen!

Revelano.

La Jarkunveno de UEA en Budapeŝt. Granda festposttagmezo en la Socia Muzeo. — Edziĝo per Esperanto.

La 28-an de marto, pasklunde posttagmeze je la kvara, kunvenis proksimume 50 personoj en la ĉambrego de la Socia Muzeo ornamita per girlandoj kaj afiŝoj (precipe pri la praha kongreso) kaj per alvokoj al komuna laboro. Je 4.50 h. s-ano Balkányi kunvokis la UEA-jarkunvenon kaj proponis kiel kunsidan prezidanton d-ron Rácz, kiun oni unuvoĉe elektis. S-ano Balkányi, kiel delegito de UEA, laŭlegis la jarraporton, laŭ kiu estas ĝis tiu tago 64 UEA-membroj en Budapeŝt kaj ĉirkaŭaĵo, — nombro, kiun oni neniam atingis ĝis nun en Budapeŝt, sed kiu estas tamen malgranda rilate al la nombro de esperantistoj. Li parolis pri la neceso de **mondorganizado** de esperantistoj por povi efike labori kaj signifi potencon. La movado ne estas ankoraŭ tiel forta, ke oni povas labori sukcese nur en fakaj, naciaj

La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Tradukita laŭ la 5-a Rusa eldono kun permeso de la aŭtoro Maria Ŝidlovskaja.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio. (20-a daŭrigo.)

Jam preskaŭ tagiĝis, kiam fine ambaŭ knabinoj ekdormis profundan junecan dormon. Samtempe Mateo, vekiginte post mallonga duondormo, penis rememori, kie li estas kaj kio okazis. Sileniginte dum mallonga tempo, la urbejo trans la muro komencis vekigi. Pli rapide ruliĝis radoj en proksima stacio, kaj jam preterkuris la unua vagonaro, bruanta kiel vento en pina arbaro dum nuboriĉa mateno.

Sur la apuda kuseno kuŝis la kapo de Dima. Sed Mateo kun peno rekonis sian amikon. La vizaĝo de Dima estis ruĝa pro la amelita kolumo de lia nova ĉemizo, kiun li ne estis formetinta vespere. Liaj longaj kozakaj lipharoj estis multe mallongigitaj, kaj la pinto de unu lipharo estis turnita supren. Entute, ĉe la vido de tiu preskaŭ fremda vizaĝo Mateo sentis ofendiĝon... Ŝajnis al li, ke Dima fariĝas fremda...

XI.

Efektive, de la sekvinta mateno estis evidenta, ke la karaktero de Dima malboniĝas.

Vekiginte li antaŭ ĉio rapide sin vestis, aliris al spegulo kaj komencis suprentroti siajn lipharojn, kio faris lin tute ne simila al la antaŭa Dima. Poste, apenaŭ salutinte Mateon, li aliris la irlandanon Paddy kaj komencis interparoli kun li, videble fiero pro ĉi tiu konateco kaj kvazaŭ fanfaronante antaŭ Mateo per siaj senĝenaj manieroj. Al Mateo tamen ŝajnis, ke kelkaj el la amerikanoj ironie rigardas Dima'n.

La logataro de Mr. Bork estis sufiĉe diversspeca: germanoj, unu liĝlo, du—tri angloj kaj

Nova Venko de Esperanto.

La X-a Internacia Konferenco de la Ruĝa Kruco en Genève, Svis., (30. Marto - 7. Aprilo) alprenas Rezolucion por Esperanto.

La X-a Internacia Konferenco de la Ruĝa Kruco en Genève alprenis en sia plenkunsido de 7. aprilo jenan rezolucion, laŭ propono de la ĉina delegito s-ro d-ro Wong:

Konsiderante, ke la malfacileco de la lingvoj malhelpas sufiĉamaniere la realigon de la internacia idealo de l' Ruĝa Kruco, ĉu en la verko de helpo sur la batalkampoj, ĉu en tiu de la militkaptitoj, ĉu eĉ en la kongresoj de la Ruĝa Kruco, —

la X-a Konferenco invitas ĉiun organizaĵon de la Ruĝa Kruco kuraĝigi al la lernado de la helpa lingvo Esperanto inter siaj membroj, precipe inter la junulaj sekcioj, kiel unu el la plej potencaj rimedoj de internacia interkonsento kaj kunlaboro en la sfero de l' Ruĝa Kruco.

La propono de la ĉina delegito estis subtenata de la serba, germana, pola kaj svisa delegitoj. Jen nova venko, pri kiu ni povas vere ĝoĝi.

kaj partiaj socioj kaj grupoj, ĉiuj ĉi povas esti nur signifaj kaj malgrandaj! Antaŭ ĉio ni devas unuigi en UEA, eĉ tiuj, kiuj momente ne havas utilon per ĝi! Se UEA havus centmil membrojn, ĝi povus vere efiki antaŭ la tutmondo. Ĝis tiam estas ridinde paroli antaŭ la publiko pri centmiloj da esperantistoj, kiam eĉ la mondorganizado havas nur kelkajn mil! Se ni helpos per UEA al nia lingvo, tio forte antaŭenpuŝos la laboron de ĉiuj fakaj kaj partiaj esp. celadoj.

La ĉeestantoj aprobis plejparte la paroladon kaj kun intereso aŭdis pri la diversaj servoj faritaj de la delegito dum la lasta jaro por eksterlandanoj el la plej diversaj landoj.

Fine s-ano Balkányi alvokis la ĉeestantojn elekti alian delegiton, kiu eble pli taŭgas por tiu celo kaj pli kunigos la divers-opinian esperantistaron de la urbejo nun sufiĉe — bedaŭrinde — disigitan. Sed neniu proponis iun; laŭ propono de la prezidanto d-ro Rácz oni unuvoĉe reelektis s-anon Balkányi. Per ĉi tiu finigis la unua oficiala UEA-jarkunveno en Budapeŝt.

Nun sekvis la amuza programo kun festposttagmezo. Sed antaŭ ĝi la ĉeestantoj iris sur la verda standardo laŭ arango de s-ano Laquer al la proksima preĝejo, kie je la kvina horo estis la edziĝofesto de s-ano Jenő Szabó kun s-anino Ilonja Michalzy. Li estas ŝia instruisto ĉe esperanto-kurso dum la somero. — Kiel poste s-ano Laquer rimarkis, ili certe tre ofte ripetis la verbon „mi amas, vi amas, mi amas vin, vi amas min“, kaj fine ili edziĝis por pruvi la „interkomprenigan“ forton de Esperanto! En la preĝejo ĉeestis sur la verda standardo 60 esperantistoj, kiuj la elirantaj novajn geedzojn salutis per flirtigo de paperstandardoj, kaj s-ano d-ro Lorand alparolis la novan paron salutante ilin en nomo de la esperantistoj!

Pri la sekvinta posttagmezo en la Socia Muzeo, kiu estis bela signo de samideaneco kaj harmonio, ni raportos, se la loko permesos, en venonta numero.

Kroniko.

LOCARNO (Svis.). La del. de UEA, s-ro Carlo Gilá, industriisto kaj direktoro de la Fabbriche Riunite varbis la regionan Komercan Ĉambron por Esperanto. S-ro Gilá estas lastatempe ankaŭ elektita urba konsilanto. — La tiĉina gazetaro, precipe la du gravaj komercaj ĵurnaloj „Il Ticino“

kiu en malfacilaj okazoj estis ilia interpretanto. Reveninte Dima aliris Mateon kaj diris:

„Auskulu, Mateo, kion mi diros al vi! Ni ambaŭ sidas ĉi tie sen laboro kaj elspezas nur nian monon. Tamen estas timo por ion enspezi.“

Mateo levis la okulojn kaj silente atendis, kion pli diros Dima.

„Jen aŭskultu. Tiuj ses viroj estas agentoj aŭ, kiel oni nomas ĉi ni, 'faktoroj' de Tammany-Hall. Ekzistas ĉi, — ĉu vi komprenas? — tia asocio... Baldaŭ ili havos elektojn. Kaj ili deziras elekti kiel urbestron sian virion. Tiam ĉiuj ceteraj oficistoj estos ankaŭ el iliaj partianoj. Nu, komprenable, tiam ĉio en la urbo fariĝos laŭ ilia plaĉo...“

„Nu?“ demandis Mateo.

„Nun ili kolektas voĉojn. Ili diras, ke por niaj du voĉoj ili pagos pli ol por mia sola... Por ni tio ja tute ne estas malfacila... Ni devas nur enskribriĝi nin en unu ejo kaj ne diri, ke ni nur antaŭ nelonge alvenis en la urbon. Poste... Poste ili ĉion aranĝos kaj nin gvidos...“

Mateo memoris, ke Dima unufoje jam parolis al li pri la samo, li memoris la severan kaj plenan je malsato mienon de Bork, kiam li estis rakontanta pri la profesio de Paddy. El ĉio ĉi en la animo de Mateo kreigis decido, kaj en siaj decidaj li estis obstina kiel bovo. Tial li kategorie rifuzis.

„Kial vi ne volas? Diru!“ demandis Dima nekontente.

„Mi ne volas!“ obstine respondis Mateo. „La voĉon Dio ne donis al homo por ĝin vendi.“

„Ha, malsagaĵo!“ kriis Dima. „Ĉu vi mem restos sen voĉo? Vi eĉ ne ratiĝos. Se oni aĉetas, kial ne vendi? Ĝi tamen estas enspezo, ne elspezo...“

„Ĉu vi memoras, Ivano, kiel iam en Loziŝci la bienadministranto admonis nin subskribi iun paperon? Kio estus rezultinta el tio?“

(Daŭrigota.)

*) Esperantu „Mettu“.

Fine Esperanto trovas fervoran kunhulpanton en s-ro redaktoro Andersen, Lillegade, Grenaa. Skribu al ĉiuj tre legeble, ĉar ili ankoraŭ ne scias Esperanton. Se oni konstato, ke cent leteroj aŭ poŝkartoj alvenos, la sukceso certe ne forrestos. S-ino Magda Mammen, Grenaa.

Kvardekjara verkista jubileo de D-ro Aleksandro Giesswein.

La 4-an de aprilo oni festis per solena prezentado la kvardekjaran verkistan jubileon de papa prelato, monsinjoro d-ro Aleksandro Giesswein. Li estas tutmonde bone konata scienculo kaj politikisto, kiu agas tre diversloke kaj multflanke por la bono de la homaro, por la paco ĝenerala, por la ideo dia, por la interkomprenigo tutmonda, por la rajtoj egalaj, por pli bela estonteco de kulturaj, veraj homoj! Li estas membro de la Hungara Scienca Akademio, prezidanto de la Sankta Stefana Akademio, subprezidanto de la Sankta Stefana Societo, parlamentano de multaj jaroj antaŭe en la deputitdomo, nun en la nacia kunveno. Li estas prezidanto de multaj societoj, inter ili de la Hungara Societo de Paco por la Ligo de Popoloj, de la Feminista Societo, kaj ankaŭ de la Hungara Landa Esperanto Societo deposit ĝia fondiĝo.

La hungaraj esperantistoj povas esti fieraj, ke tia vere „senkrona princo“ estas ilia ĉefo; bedaŭrinde lia multflanka, aliloka laboro lasas al li nur malmultan tempon ion fari por nia movado, sed ofte ankaŭ lia nomo jam multe helpis al ni! La solenan prezentadon partoprenis la membroj de liaj societoj kiel gastoj kaj forte solenis lin. La Landa Societo sendis apartan deputacion, kiu drandsonis al li por tiu celo verkitan memorskribaĵon, kiun li ĝojege akceptis. La ĉambrego de la granda Muzikakademio estis tute plenege por la festantoj. Tiu ĉi tago apartenis al la maloftaj veraj homaj festotagoj, kiam ni vidas merititan sukceson kaj kulturlaboron de vera homo bedaŭrinde tiel malofita en nia epoko! Ni esperas ke nia eminenta samideano ankoraŭ dum jardekoj sukcesaj gvidos la ĝis nun tiel bone gvidatajn diversajn sed unuclajn movadojn por atingi iliajn certajn triumfojn!

Tra la Mondo.

El Domo Doorn alvenis telegramo, ke la germana eks-imperiestrino Auguste Viktoria mortis lundon je la 6.15 h. matene.

La japana parlamento alprenis leĝon, per kiu la metra sistemo estos devige enkondukata en Japanio.

La nacia kongreso de Guatemala konfirmis la traktaton de San José, laŭ kiu estas kreata la unuigo de la mez-amerikaj respublikoj. Ĝis nun subsignis Guatemala, Honduras kaj San Salvador; subsigno per Kostarika okazos baldaŭ. La teritorio de la Unuigitaj Ŝtatoj de Meza Ameriko havos areon de pli ol 500 000 km² kun ĉ. 4 milionoj da enloĝantoj.

Internacia Esperanto-Servo.

LETERO EL ITALIO.

Bologna, la 9. aprilo 1921.

Plej grava okazaĵo nuna estas eksigo de l' Parlamenta Deputitaro per dekreto de 7. aprilo kaj konsekvanta preparado por la ĝeneralaj elektoj, kiuj estos voĉdonataj la 15. majo en la 40 kolegioj, kies difinoj oni faris en la regno grupigante diversajn provincojn en samaj regionoj. La balotado okazos per proporcia sistemo laŭ partiaj listoj kaj donos sume 550 deputitojn. Voĉdonos tiam unufoje ankaŭ la laste aneksitaj provincoj.

Jam en mia lasta korespondajo mi klarigis la situacion, kiu konsilis eksigon de l' deputitaro kaj reelekton. Notinda teksto de raporto prezentita de l' Ministraro flanko de l' dekreto propono ilin resumus, aserante plue, ke, per la lastaj traktatoj kun eksterlando kaj per la preterpasinta periodo de interna politika konflikto, oni povas de nun konsideri, ke pacostato efektiva komencis necesiginta novan vokadon al la nacio por esprimi pri siaj volo.

Rimarkinda estas jena frazo: „La internaj kondiĉoj en kelkaj provincoj maltrankviligataj estis laŭ ilu argumento por prokrasto al l' voĉdonado, dum al la Registaro ili ŝajnas esti kaŭzo por eĉ baldaŭigi ĝin, ĉar la volo de l' nacio libere esprimita estos la plej granda forto por komandi al ĉiuj ĉesadon de l' violentaĵoj kaj plenan restarigon de l' observo al la leĝoj.“

Por tio la raporto deziras al la partioj, ke ili sciu elekti siajn kandidatojn tiel, ke la nova deputitaro havu sufiĉan seriozecon pri intencoj kaj sufiĉan moralan aŭtoritaton por rajte ekzerci tiun altan moralan direkcion de l' naciaj aferoj, kiu devus esti plej alta celo de nacia reprezentantaro. (Kaj la manko je tio estis la kutima ĉefkulpigo farita al la pasinta reprezentantaro.)

Samtempe la raporto skize atentigas pri la gravaj problemoj, kiuj ankoraŭ estas sur la grundo kaj estos tuj prioritataj de l' novaj deputitoj laŭ la deziresprimoj, kiujn al ili vidigos la voĉdonontaro: ĉefe, daŭrigo de l' financa resanigo iam

bone iniciatita (de 14 miliardoj malreste dum unuaj monatoj de 1919 al 4 miliardoj nune, laŭ anonco de samraporta paraĝrafo), juĝeca reformo, lernado, reordigo de publikaj administracioj (burokratio), organizo de l' tekultura laboro, starigo de laborista kontrolo en industrioj.

La lando jam eniris de kelka tempo la karakterizan epokon antaŭirantan al voĉdonado. La plej bone organizitaj partioj (socialista, popular-katolika), kiuj havis sume 260 sur 508 deputitoj kaj ne ĝojmiene akceptis unuatempe la proponon pri eksigo, nun faris „bonan mienon al malbona ludo“ kaj eĉ asertas sian optimismon. Ili ne kaŝas al si, ke la novaj elektoj malfacile povos redoni al iliaj vicoj saman nombron da parlamentanoj, sed ili esperas porti novajn pli lertajn elementojn en la deputitaron por ekzerci eĉ pli efikan kontrolon pri la ĝenerala politiko. Socialistoj tamen anoncas daŭrigo en sia konduto nepre ne-kunlaborema kun la burĝaj registaroj estantaj aŭ estontaj.

Tiu grava forto, kiu estas hodiaŭ la faskista organizajo, ŝajnas eĉ akcepti principon helpi la formadon de „naciaj blokoj“ de l' tiel-diritaj regemaj partioj (de dekstre-liberaloj al socialistoj-reformistoj), precipe en la kolegioj, kie la socialistoj estas plej nombrofortaj. Programoj, subpartioj, ĉefuloj estas en grava interdiskutado por la starigo de bazoj de l' prezentotaj kandidatlistoj kaj de la laboro postulota de l' nova Parlamento.

D-ro Umberto Toschi.

LETERO EL ESTONIO.

Tallinn, aprilo 1921.

Abstinencajn legantojn de ET eble interesos resumo de la ĉefa laboro de dum Pasko (26.—28. marto) en Tartu (Dorpat) okazinta 11-a Tut-Estonia Abstinenca-Kongreso.

Unu el la plej gravaj estis la decido fondi, anstataŭ la ĝis nun funkciinta landa centra abstinenca-komitato, Tut-Estonian Ligon de l' Abstinenca-Societoj. Tio ĉi helpas al la disvolvado de konscia abstineneco en la sportaj, junulaj, studentaj, virinaj k. a. sferoj, donante al abstinencaj fakgrupoj la eblecon formiĝi ĉe respektivaj societoj kaj promesante subvenciojn kaj moralan subtenon al tiaj subgrupoj.

Por la koncentrigo de la propagandaj fortoj estis decidita la fondo de instituto por propagandaj parolistoj. — Ĉe ĉiuj societoj abstinencaj ekfunkcios sportaj grupoj. — Fervole abstinenca-ekspozicio en ĉien movebla speciala vagono kun speciale por ĝi dungita lektoro estas aranĝata.

Por abstinenca laboro estas praktikata per malfermo de abstinencaj popularaj restoracioj kaj noktumejoj-dormejoj. Tre intensigata estos la laboro inter la gejunuloj, la studentoj kaj soldatoj. Estas ankaŭ fondota abstinenca-propaganda libro-eldonejo. — Estu rimarkigite, ke la enlanda ligo de virinoj estonaj senkondiĉe deklaris sin por la malpermeso de la vendado de alkoholaĵoj, kiu ja nun estas oficiale permesita en nia lando. La ligo de virinoj, aligante al la estonta Estonia Abstinenca-Ligo, certe tre sukcese eklaboros kontraŭ la uzado de alkoholo en virinaj rondoj.

Ĝojinde, nuntempe nesufiĉe de monrimedoj por la propaganda agado, estas forigebla.

Entute, la kongreso opiniis, ke nune estas neeble realigi la aspirindan plenan malpermeson de la uzado de alkoholaĵoj por neteknikaj celoj. Tial la plimulto de ĝiaj anoj postulas nur la plejblan limigon de la uzado de alkoholaĵoj en Estonia Respubliko, ekz. per severega monopoligo de l' alkohol-vendado publika, la aplikon de la t. n. Göteborg'a sistemo aŭ simila. H. Sakarias.

Gazetaro.

ARBETET. Malmö (Svedio), 24 marto.

Granda tagjurnalo raportas pri la parolado de s-ro Backman pri „Esp. kaj la kulturlaboro“.

BOTTROPER VOLKSZEITUNG. Bottrop (Germ.), 15., 17., 22. kaj 26. marto.

Enhavas diversajn artikolojn pri Esp. kaj anoncojn pri esp. parolado kaj kurso.

DAS NEUE DEUTSCHLAND (La nova Germanujo), febr.-maro. Eldonejo de Fr. Perthes, Gotha.

Enhavas interalie artikolon germanlingvan pri la stato de la esp. movado, de d-ro M. von Hagen en Berlino. La artikolo ŝajnas verita objektive, sed la aŭtoro eble kredas pli je Esp. ol li supozigas. La postskribo de la redakcio vidigas kelkajn jam sufiĉe konatajn antaŭjuĝojn rilate al Esp. kaj la esp. movado, kiuj jam ne povas nin maltrankviligi.

FRANKFURTER ZEITUNG. Frankfurt (Germ.), 26. marto, vespera eldono.

Tre ŝatata kaj multe legata jurnalo. Raportas laŭ ET pri la enkonduko de Esp. en la lernejoj de la svisa kantono Genève kiel deviga fako.

FRANKFURTER MESSZEITUNG, 1-a kaj 2-a special-numeroj pri la printempa foiro 1921.

Kun tre valoraj artikoloj. Precipe interesa la artikolo en n-ro 1 pri la ekonomia situacio en Estonio. Sub rubriko „Wirtschaftlicher Ausblick“ estas senpage indikataj interalie kelkaj firmoj, kiuj deziras ofertojn pri komercio en Esperanto. Eksterlandaj samideanoj instigu la komercistojn de sia lando utiligi tiun bonan aranĝon.

MANNHEIMER TAGEBLATT. Mannheim (Germ.), 17. marto.

Enhavas recenziĝon pri n-ro 22 de ET (n-ro pri Praha) kaj rekomendas la jurnalon al komercistoj kaj filatelistoj.

Recenzejo.

NOVA AFISO germanlingva de la Lab. Esp. Unuigo en Chemnitz pri la esp. instruado al infanoj. (Estas konate, ke en Chemnitz nuntempe 1000 infanoj lernas Esperanton.) La nova afiso estas tre efika per sia flava koloro kaj precipe per sia grandecego (preskaŭ 90.60 cm). La afiso estas presita en la presejo Hease & Kaufmann en Chemnitz, Königsplatz 4. Interesuloj sin turnu al tiu ĉi grupo.

Pri „Zamenhof-Strato“ en Lodz.

Juda ĉiutaga jurnalo „Der Naje Hajn“, la plej disvastigita gazeto inter judoj polaj, kiu cetere ŝajnas favori al Esperanto, skribis la 6. marto nunjara laŭvorte:

„Al judoj ne konvenas loĝi en strato kun juda nomo.“

Antaŭ kelke da monatoj la lodza urba konsilantaro, ne atentante la akran opozicion de la „Naciaj Demokratoj“ kaj la „Nacia Laborista Partio“, decidis nomi la straton Rozvadovska je la nomo de la kreinto de Esperanto, doktoro Zamenhof. — Siatempo la tieaj antisemitaj gazetoj akre elpaŝis kontraŭ la nomdono de lodza strato per juda nomo. La magistrato tamen trankondukis la decidon kaj ŝanĝis la nomon de la ĉiŝta strato. — Nun la magistrato ricevis memorskribaĵon de la domposedantoj de la supre citita strato, inter kiuj ankaŭ troviĝas judoj, kiuj petas repreni la decidon pri ŝanĝo al la nomo de la ĉiŝta strato, ĉar al ili ne konvenas loĝi en strato, kiu portas germanan nomon... Sekvas naŭ (9) subskriboj.

Lodza samideano komunikis al ni la tekston de la plenda memorskribajo, kiu laŭvorte estas:

La magistrato per sia cirkulero de la 23. januaro 1921 postulis transfari la pordego-ŝildetojn, kaŭze de la transnomo de nia strato je „Zamenhofa“.

Kontraŭ tiu ĉi decido ni protestas, kiel domposedantoj en la Rozvadovska-strato (nun Zamenhofa), ŝanĝi tiun lastan je strato de Zamenhof, kiu estas germana nomo.

Ni kunsocias, ke ni samtempe endoncis plendan memorskribaĵon en la lodzan vojevoĉoficejon. (Sekvas subskriboj.)

Sporto.

SVEDA PIEDPILKISTARO EN GRAZ.

La 30-a de marto 1921 venigis por Graz, por Aŭstrio, ja por tuta Mezeŭropo okazintaj de nekutima graveco: svedaj sportistoj veitulis kontraŭ striaj konkurantoj, kiujn ili venkis 3:0

Kiel sciante, la sport-unuigoj en la „Entente“ kaj poste ankaŭ en kelkaj neŭtralaj ŝtatoj decidis la bojkoton al la kolegaro en la antaŭe malamikaj Germanujo, Aŭstrio, Hungarujo kaj Bulgarijo. Per tio la multalaŭdita solidareco inter la sportistoj suferis plendindan puŝon. Kien, se eĉ tiaj homoj, kiuj akcelas pliboniĝi per la konkuro kun la plej bonkvalitaj kamaradoj en aliaj landoj, subigas al la stulta ŝovinismo, eĉ post la subskribo de l' diversaj „pactkontraktoj“? Tiun kontraŭisencon ekkonis tuj la nobla nacio de Svedujo kaj decidis vire malŝati la supre cititan senencaĵon, kiu hontigas la homaron kaj humanismon, kiun sole defendi ĉiam pretekstis la samaj, kiuj montriĝis kapablaj por tia ago. Ĉar nun la svedoj sin liberigis el tiu maljusteco, ili meritis la dankon ne nur de la bojkotitoj, sed ankaŭ de ĉiuj veraj homaramantoj, kiuj portas la noblajn sentojn ne sole sur la lango, sed precipe en la koro.

Eble Esperanto helpos disbati la glacien de la alterna artifa malamikigo. Ĝi iĝis jam infanaĉa. Jur. Dolf Halbedl, Graz.

VETNAĜO.

En Chicago starigis amerika naĝistino novan mondrekordon, tranageante 50 jardojn en 35,6 sek.

Parolejo.

68.

Pri „Esperanto Triumfonta“.

Est. sinjoro!... Preskaŭ certa mi estas, ke la plej multaj el viaj abonantoj ĝojuas, se la sekvontaj reformoj estus faritaj en „Esperanto Triumfonta“:

1. Formato simila al tiu de „Esperanto“ de UEA.
2. Presliteraro de la sama modelo uzata de ĉiuj gazetoj en Nord- Sud-Ameriko kaj preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj.
3. Ne uzi mallongigojn, escepte la malmultajn konatajn de la esperantistoj.

Ĉiuj profitus per tiuj ŝanĝoj, ĉar:

1. La gazeto duobliĝus ĝis ok paĝoj, plibeligante kaj tiam la formato ne estus senproporcia kiel nun, kies longo estas eksterordinaria por ĝia larĝo.
2. La presliteraro, kiun mi signifas, kies modelon mi kunsendas, estas pli klara kaj eleganta ol la nun uzata, kiu ŝajnas kvazaŭ gotika. Tiuj latinaj literoj igus la gazeton ŝajni vere internacia kaj neniu povus plendi sed aplaudi.

La mallongigoj estas preskaŭ ĉiam malfacile kompreneblaj, kaj ŝparas nur malmultajn liniojn en unu tuta gazeto.

Estus plezurige al mi vidi publikigitaj tiun ĉi rimarkojn en „Esperanto Triumfonta“. Iel ke ĉiuj ĝiaj legantoj esprimu siajn opiniojn, ĉu la afero estas tiel grava kiel mi pensas.

M. d. V., Habana.

☆ ☆ ITALA ☆ ☆ ESPERANTISTO

Oficiala Organo

de la Federacio Esperantista Italiana. * * *

larabono: 15 Liroj. Helpabono: 20 Liroj.

Administrejo: Via Rossari 2, Milano (Italio).

J. Nagamacu, Fuknoka (Japanujo), Imperia Universitato, medicina fakultato, deziras korespondi kun tiujmondaj samideanoj per poŝkartoj ilustritaj kaj leteroj.
S-ro F. Peedo-Winkel, Fontanka 27, Estokomice, Petrograd (Rusio), interŝanĝas sovjetajn kaj estonajn poŝmarkojn.
S-ro Emiel van Grieken, 123, avenue Prudent Bols, Leeken (Bruxelles, Belgio), deziras interŝanĝi poŝmarkojn.

Internacia Foiro de Breslau

Dua Printempa Foiro samtempe **52. Poragrikultura Maŝinofiro**

2.—5. Junio 1921.

Agrikulturaj maŝinoj kaj iloj; maŝinoj kaj iloj por fiŝkaptado, arbara ekspluato, ĝardenkulturo, birdar- kaj abel-bredado, ĉasado; artefaritaj sterkajoj, semajoj; agrikultur-industriaj instalaĵoj; maŝinkonstruado kaj tekniko; konstrumetio kaj konstrumaterialo; * * * * * arto kaj armeio, internaj dekoraciaĵoj; buroaj; sporto. * * * * *

Informojn donas

Breslauer Messe-Gesellschaft m. b. H.

ESPERANTO-FAKO

Breslau I, Ohlauerstr. 87.

Angla kaj Esperanta Etimologio

(Angle kaj Esperante).

Verkita de Charles G. Stuart-Menteth.
(Oksforda diplomo kun distingoj).

„Utila lernilo per atentigi la publikon pri multaj Esp. radikoj en ilia lingvo.“ *Holanda Pioniro.*

„Intereseĝaj tabeloj.“ *Kristana Espero.*

Prezo 10 pencoj (= 4 respond-kuponoj) afrankite.
17, Hart Street, London W C 1.

Adolfo Oberrotman

Varsovio, Polio, Krak-Przedm. 10

povas liveri al seriozaj pogranda filatelistoj kolekton da diversspecaj poŝtmarkoj, ĝis 50 serioj diversaj: Ukrainaj, rusaj jubileaj Romanoff, rusaj sovjetaj, kaj ĵus aperintaj en Litovio de generalo Zeligowski. Ankaŭ malnovaj moneroj. La pago per bankbiletoj, respond-kuponoj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj.

RAKONTETOJ. Al ĉiulandano, kiu sendos al mi ĝis 10. majo 1921 du-tri rakontetojn esperantigitajn el infana legolibro (kresjomatio), mi respondos per bela vidaĵkarto el Svisujo aŭ tavolo de svisa ĉokolado. (Mi ne bezonas rusajn nek francajn nek germanajn rakontetojn, ĉar mi ilin jam ricevis.) Ekster-eŭropanoj sendu ankaŭ. — A. Mexin, 65, Grand' Rue, Montreux, Svisujo.

Anoncetoj.

DANKO. Al ĉiuj sendintoj de gratuloj por mia naskiĝo mi dankas kore. Mi promesas fariĝi bona esperantistino. — Paska Leporeto Lydia Jung en Horrem (Germ.).

DESEĜNO-PAPERO. Johano Toman, Budapeŝt IX, Gat-u. 25, 1-8, petas universitatajn studentojn sendi al li tufollajn desegno-paperojn; ĉar en Hungario tiuj nur karege estas riceveblaj. Ĉiun sendon li tuj rekompencos per esperant-ajoj.

INSTRUIO AŬ KONTORO. Juna litova mezlerneja instruistino (esperantistino), dezirante perfektigi en uzado de germana lingvo, volas pasigi 2-5 somerajn monatojn en Germanio aŭ Svisio. Povas instrui litovian, latvan aŭ rusan lingvon, korespondi en ili aŭ okupiĝi en kontoro. Propozojn adresu al: J. Mačernis, Kaunas, Lkmerges pl. 48, Litovio.

LA RUSAJ SAMIDEANOJ ne havas la eblecon aboni eksterlandajn esp. gazetojn kaj aĉeti esp. librojn kaj petas fial sendi al ili fialojn. Ĉiujn esperant-ajojn sendu al Helmi Drezon, vicdel. de UEA en Tallinn, Estonio, p. k. 6, nolinte la sendaĵojn per „por transsendo Rusion“.

POŝTKARTOJ montrantaj la plej famajn polajn poetojn, muzikistojn, pentristojn, kiel Mickiewicz, Slowacki, Chopin, Moniuszko, Paderewski. Matejko kaj multajn aliajn, des pli valoraj ĉar ili parte montras nacian vestaĵon, riceveblaj ĉe POLA ESP. SERVO, Bydgoszcz (Polio), Podgorze 17. Prezo por unu serio (12) 2 resp.-kup. aŭ du Esp. insignoj. Same ricevebla la popol-kanto „Kiu sin donas“ de la fama verkisto Jozef Jan Kochanowski, maistre tradukita de Bruno Kuhl, kun melodi-aldono. Prezo por serio kiel supre. Instruk. gvidilo tra Bydgoszcz 1 resp.-kup.

SPORTO. Eŭgenio Mayer, Budapeŝt VII, Dob-u. 56, fsz. 5, deziras korespondi precipe kun sportistoj kaj interŝanĝas atletikajn poŝtkartojn ilustr. Certe respondas.

SIGELMARKOJ, INSIGNOJ KTP. Unua Viena eldonejo de esperantaj propagandaj sigelmajkoj kaj insignoj, Jozefo Kocourek, gravuristo, petas kontatini kaj interusoliti por interrilato. Ĉar mi jam helmevenis el rusa militkapitejo. Wien X/3, Aribaber-Platz 3-14. Postulu specimenaar kontraŭ unu respond-kuponon.

DEZIRAS KORESPONDI AŬ INTERŜANĜI:

M. Goldberg, Białystok, Polujo, Sienkiewicza 88, deziras korespondi kun ĝermanantoj en ĉiuj landoj, ankaŭ interŝanĝi poŝtmarkojn kaj papermonon, kun kiu ajn. Tuj respondos.

A. Hiller, Warszawa, Polujo, Ogrodowa 26/51, deziras korespondi pri laborista movado, komunismo, ankaŭ interŝanĝi poŝtmarkojn kaj papermonon. Tuj respondos. Kiu bezonas bonan polan poŝtmark-kolekton, tiu povas interŝanĝi poŝtmarkojn kun mi. Mi korespondas ankaŭ pri matematiko kaj natur-scienca. Mia adreso: Lazaro Grosberg, Białystok, Polio, Jurowiecka 5.

Fraŭlino Meta Sternberg, Berlin-Pankow, Alte Schönholzer Str. 6, deziras korespondi per poŝtkartoj kaj leteroj kun samideanoj eksterlandaj; ĉiam tuj respondos.

S-ro Rudolf Rosenfeldt, Estonio, Tallinn, Vaksali tän n-ro 18, k. 1, interŝanĝas poŝtmarkojn, poŝtkartojn ilustr. kaj papermonojn.

S-ro Semjon Voroncov, Kaasani t. 19-5, Tallinn (Estonio), deziras korespondi kun fraŭlinoj.

S-ro Boris Rukaviŝnikov, Rusio, Ĉasovenaja 65, kv. 3, Saratov (adreso: Tallinn, Estonio, p. k. 6, por transsendo), deziras interkorespondi kun kolektantoj de monbiletoj ktp.

S-ro Michel Ambros, Zabalkanski pr. 53, Petrogrado, Rusio (adreso: Tallinn, Estonio, p. k. 6, por transsendo), deziras korespondi kun estonoj, japanoj kaj angloj.

S-ro George Ašanin, Nisokaja ul. 27, kv. 2, Kronŝtad, Rusio (adreso: Tallinn, Estonio, p. k. 6, por transsendo), deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

Poŝtmarkojn perfektajn turkajn kapitulaciajn aŭ palestinajn malofajn sendas P-ro E. Schmitz en Haifa, St. Charles, Palestino, al ĉiuj sendintoj iulanda de egalvaloraj laŭ Senf aŭ Yveri 1921.

Alfred Proschka, poŝtociŝto, Kaaden, Bohemio, Ĉeĥoslovakio, interŝanĝas poŝtmarkojn kun turtomdaj filatelistoj, interŝanĝas esperantajn gazetojn.

S-ro Sandor Lissauer, Szechenyi u. 55, Miskolc (Hungario), deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj kun la tuta mondo.

S-ro Karlo Markovits, Budapeŝt VII, Elemer f. 1, 8, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustritaj.

S-ro Stefano Bakonyi, Budapeŝt IV, Szep. u. 5, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustritaj.

Kiu sendos al mi 25-50 poŝtmarkojn de sia lando, ricevos same tiom da nuntempaj germanaj poŝtmarkoj. Karl Kueper, Düsseldorf 3 (Germ.), Graf Adolfsstr. 11.

S-ro Paul Münten, Düsseldorf (Germ.), Fürstenwall 119, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj; ĉiam respondos.

Anton Theileis, Düsseldorf (Germ.), Johannsstr. 28, deziras korespondi kun ĉiuj landoj, plej volonte per poŝtkartoj.

Edwin Haschke, Breslau (Germ.), Kronprinzenstr. 11, 18-jara, deziras korespondi kun gesamideanoj de tuta mondo per poŝtkartoj ilustritaj; mi respondos tuj.

Joachim Kraft, Berlin-Neukölln (Germ.), Weigand-Str. 58, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj korespondi per ilustr. poŝtkartoj.

Ladislav Szilasi, Budapeŝt V, Podmanicki-u. 75, deziras korespondi kun junuloj instruitaj, muzikemaj.

F-ino Margareto Toman, Budapeŝt IX, Gat-u. 25-1-8, deziras korespondi kun ĉiulandaj samideanojn.

Mi vendas hungarajn poŝtmarkojn, multe pli malkare ol katalog-prezoj. — Kolomano Wiesinger, Budapeŝt VII, Wesselyny str. 50.

Antal Szilösi, Budapeŝt V, Ujpesti rakpart 2, Varosi har, lernanto, interŝanĝas poŝtkartojn ilustr. kun ĉiuj landoj.

Emilo Klamert, Budapeŝt VIII, Prater str. 46-1-8, deziras interŝanĝi papermonon, insignojn, poŝtkartojn ilustr., leterojn, poŝtmarkojn, kaj Esp. gazetojn.


S-ro L. Naray, Kispest (Hungario), Kossuth-Lotos-u. 50, deziras korespondi pri socialismo kaj laborista movado, per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj.

Gasmotor-Fabriko Deutz

Köln-Deutz (Germanio).


DEUTZ Motoroj

en ĉiuj grandecoj kaj specoj pro ĉia brulmaterialo speciale por Benzino, Benzolo, Petrolo, Alkoholo kaj Nafto.



DEUTZ Gasproduktiloj

Suĝas-, Hejtgas- k. Akvoprovizaj Instalaĵoj.



DEUTZ DEUTZ
Motor-Lokomotivoj
Lokomobiloj
Boatmotoroj.

Vertikalaj k. horizontalaj
Motoroj
Sistemo Diesel.



Nur alskriboj de seriozaj firmoj estas konsiderataj.